

# Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo)

エスペラントよこはまのエスペラント文会報

## Serio Oriento-Okcidento\*<sup>1</sup> fokusita En Hama-Ronda Tago\*<sup>2</sup>, marte en la Muzeo

En la 31-a de marto, posttagmeze por 2 horoj en Esperanto-Muzeo Jokohama, ni havis Hama-Rondan Tagon kun 7 partoprenantoj, kun la temo “Serio Oriento-Okcidento”.

La Serio temas pri altkvalitaj mondaj literaturaĵoj, asignitaj de UEA, ekde 1961, kaj enhavas pli ol 60 pecojn, inkluzive de ĉi-jare nomumita “La libro de mil kaj unu noktoj”.


Unue Sibayama Zyun'iti klarigis pri la serio kaj kelkaj el la libroj en la serio, elprenante la preparolotan libron el la librobreto, en kiu estas preskaŭ ĉiuj de la Serio.

Due, Mizro Iwaya parolis (foto dekstre) pri du libroj en la serio, kiujn li legis; nome (1) “Malsata Ŝtono” de Tagor, hinda aŭtoro, kaj n-ro 1 en la Serio, kaj (2) “Je la flanko de la profeto”, la sola originalaĵo (ne-tradukaĵo) en la serio, pri la vivo kaj pensmaniero de Muhanmad.

Trie, la prezenton pri “Kvin virinoj de amoro”, japana klasikaĵo, faris Tanigawa Hiroshi per anstataŭlego de Sibayama.

\*1 Pri la Serio kaj ties plena listo, vidu: [https://eo.wikipedia.org/wiki/Serio\\_Oriento-Okcidento](https://eo.wikipedia.org/wiki/Serio_Oriento-Okcidento).

\*2 Temas pri evento, kie ni, rondanoj en Jokohamo kunvenas kaj traktas temon pri Esperanto aŭ per Esperanto.



## Sakuraj floroj aprezitaj kun pendlanternoj



Post la “Hama-Ronda Tago”, ses el la partoprenintoj promene vizitis la bordon de Rivero Ooka, kie sakuraj floroj estas burĝonintaj kaj ekflorintaj. Kial tiu vizito? Ĉar el milo da pendlanternoj, kiuj prilumas la sakurojn kaj la promenvojon por la “Sakura Festeno”, 10 enhavas nian nomon, nome la NPO unuflanke kaj la Muzeo aliflanke, dank’ al la mono oferita al la Festeno de nia rondo kaj rondanoj. Nia vizito estis je 17:20, do ankoraŭ la lumigtempo (je la 18:00) ne venis, sed ni povis certigi la lumigotajn lanternojn.

## eseo

## Mia saniga vivmaniero

Murata Kazuyo

Mi fariĝis 80-jaraĝa. Nekredeble!

Mi naskiĝis kiel malforta bebo pro manko de nutraĵo, ĉar tiam la Dua Mondomilito estis en la fina etapo. En la tuta lando la popoloj suferis pro aĵmanko, kaj precipe mia patro longe enlitiĝis pro tuberkulozo, tial mankis mono en mia hejmo. Kuracisto diris al mia patrino, "La bebo ne povos vivi ĝis la 2-a jaro."

Sed ŝi klopodis nutri min per rizkaĉo kaj lakto. Danke al ŝia flegado mi apenaŭ kreskis kiel malsaneta infano, ofte mi malvarmumis. Pro tio mi devis resti en lito kelkfoje dum junaĝo.

Post edziniĝo mi kolektis diversajn informojn pri saniga vivmaniero.

**Unue temas pri manĝaĵoj**

1) Evitendaj manĝaĵoj: blanka sukero, legomoj kun kemiaĵo, artefarita manĝaĵo, blanka pano, lakto ktp.

2) Rekomendindaj manĝaĵoj: legomoj kaj fruktoj, organikaj kaj senkemiaĵaj, bruna rizo, laŭeble fermentita sojfabo (*nattou*) kaj kazeaĵo farita de sojfabo (tohuo).

(Jam pli ol 40 jarojn mi aĉetas naturajn agrikulturaĵojn, kvankam ili estas iom multekostaj.)

**Mia ĉiutaga manĝaĵo: matenmanĝo** - sojlakto kun faruno de sojfabo kaj sezamo, kaj jahurto

farita de sojlakto; pomo kaj karoto aŭ tomato; nigra ajlo (fermentita).

**Trinkaĵo** - pulvoro de verda teo, morusfolio, kaj pinfolio.

**Tagmanĝo** - terpomo aŭ banano, aŭ rizaĵo kun supo (kun ovo) aŭ kun salato.

**Vespermanĝo** - ĉefe fiŝoj kun multaj legomoj; legomoj peklitaj de branumaĵo (*nukazuke*); misosupo kun multaj legomoj kaj algoj; bruna rizo kuirita kun semoj de pinarbo, kvinoo<sup>\*1</sup>, amaranto<sup>\*2</sup>, buloj de vitamino-E.

\*1. kvinoo (*kinua*): unu el la grenoj, kiu estas nutraĵriĉa.

\*2. Amaranto (*amaransasu*): unu el grenoj, kiu estas nutraĵriĉa.

**Due Vestoj**

Mi surmetas subĉemizon faritan el silko aŭ kotono, ne el kemiaĵo.

**Trie Gimnastiko**

Nun mi ekzercas min per gimnastiko ĉiumatene dum 1 horo, por moligi muskolon. Danke al tio, mi povas marŝi almenaŭ 30-40 minutojn.

**Kvare Promenado**

Mi devas marŝi pli ol 40 minutojn, sed mi ne povas plenumi ĉiutage.

## Kun germano, s-ro Weber

En 2022, nia membro Namba Fumiharu, vizitonte la 105-an UK en Montrealo, Kanado, hazarde konatiĝis kun germana samideano, s-ro André Christian Weber, sur la trajno trans la kontinento, de Vankuvero. Tiu germano vizitis Japanion turismociele kun sia nevino neesperantista. En la 18a de marto, Namba bonvenigis ilin ĉe Haneda, aerhaveno en Tokio, kaj la urbon gvidis ilin triope, Namba kaj ge-Sibayama. En la 19a ilin gvidis ge-Sibayama al Kamakura, kaj vespermanĝon havis kun Namba. En la 20a, s-ro Weber vizitis la Muzeon, kaj vidis kelkajn membrojn, inkluzive de nova kursano.



Namba kaj Weber

## Prelego


## Esperanto-Muzeo Jokohama (3)

Doi Hirokaz

## En la teretaĝo

La teretaĝo estas ĉefe por tiuj, kiuj ne konas Esperanton. Oni montras bazajn konojn pri Esperanto per paneloj. Ankaŭ estas fotografaj paneloj, sur kiuj oni vidas efektive uzatajn scenojn en diversaj Universalaj kaj lokaj Kongresoj.

Estas jenaj ekspoziciaj anguloj, laŭorde de la enirejo: porinfanaj bildlibroj kaj rakontlibroj. Kaj sekvas angulo pri MIJAZAŬA Kenĵi kaj liaj koncertoj pri Esperantaj aferoj. MIJAZAŬA Kenĵi estas fame konata verkisto en nia lando; nenie ekzistas tiu, kiu ne scias lian nomon. Ĉirkaŭ la ekspoziciaĵoj de MIJAZAŬA Kenĵi troviĝas ankaŭ aliaj fame konataj homoj. Unu el ili estis NITOBĖ Inazou. Li estis vicsekretario de La Ligo de Nacioj. Kiel vi scias, li proponis enkonduki Esperanton en publikajn lernejojn. Kaj ankaŭ poeto ISĪKAŬA Takuboku.



pri MIJAZAŬA Kenĵi

La sekvanta angulo montras la komputilan ludon Kotonoha Amrilato. Ĝi estas japana roman-videoludo, publikigita en 2017. La eldonisto nomiĝas SukeraSparo. En la rakonto, ĉefrolantino Rin hazarde eniris en misteran rozĉielan mondon. Tie oni uzas la lingvon nomatan Juliamo. Ĝi estas simila al Esperanto en strukturo, sed la uzitaj literoj tamen iom malsamaj.

Oni vidas sekvante rakon por novaj periodaĵoj.

Ili estas de universalaj, tutjapanaj, eksterlandaj, lokaj asociaj en Japanio. Vidinte ilin vizitantoj mem rimarkas, ke Esperanto disvastiĝas tra la mondo kaj tra Japanio.

Ekzistas ankaŭ ekspozicia angulo por nove eldonitaj libroj. Tie ni ankaŭ montras depresajojn rilatajn al Esperanto. Ili aperis en artikolaroj de universitatoj.

Ne mankas rako por vendi lernolibrojn, vortarojn kaj novajn librojn.

Plej profunda angulo de Ĉambro Klara troviĝas rakoj por esperantigitaj legaĵoj el diversaj lingvoj (de marto 2024 la rakoj translokiĝis en la ĉambro Ludoviko). Estas 38 originalaj lingvoj, de la ajnua ĝis la vjetnama. Vizitantoj tuj rimarkas ke multaj titoloj aŭ verkistoj sur la bretaroj estas konataj. Ŝekspiro, Dante, Dumas, Akutagaŭa ktp. “Ilin ja mi konas, legas iliajn verkojn, kaj ja en Esperanto ekzistas libroj de tiaj konataj de mi. Lingvo Esperanto estas ja certe unu el la lingvoj.” — Tiel oni sentu, ni deziras. Tute hazarde venis en la unua vico, la libro tradukita de la lingvo ajnua, t.e. de la gento minoritata en Japanio. Ni klarigas al la vizitantoj, ke tradukitaj eĉ de la ajnua lingvo oni povas legi en Esperanto.



En Ĉambro Klara, aldone vizitantoj rimarkas, ke Esperanto ne estas lingvo de tradukado, sed ankaŭ ekzistas multaj originalaj romanoj rekte verkitaj en Esperanto. Montrante la ekziston de originalaj romanoj oni imagu, ke Esperanto havas altan kapablon esprimi tiel longan verkon, kiel “Granda Kaldrono” de John FRANCIS, “Kiel akvo de l’ rivero” de Raymond SCHWARTZ, kaj multaj Baghy-aĵoj, ktp.

### Kuntema ekspozicio

Spaco de kuntema speciala ekspozicio situas en la ĉambro de Ludoviko Zamenhof proksime al la enirejo.

Ĝisnunaj temoj de la speciala ekspozicio estas jenaj. La unua ekspozicio estis “La unua lernolibro de naciaj lingvoj en ĉiu lando”. La dua estis “Libroj pri atombomboj de Hiroŝimo kaj



Nagasako”. Nuna estas la tria, “Serio Oriento-Okcidento” (Legu p.1).

Ni aranĝis la duan ekspozicion pri libroj de atombomboj. La 108-a Japana Esperanto-Kongreso okazis en Hiroŝimo en 2021-a. Bedaŭrinde la kongreso mem fariĝis virtuala pro kronviroza epidemio. Kvankam la organizanto fervore kolektis kaj klopodis ekspozicii librojn rilatajn al atombomboj, fariĝis vane. Ili sendis la librojn al nia muzeo, kaj ni amike ekspoziciis tie.


### La unua etaĝo

En la unua etaĝo, la ekspozicio estas aranĝita kun deziro, ke ankaŭ esperantistoj povus interesiĝi.

Iuj homoj estas konataj, kiel AKITA Ujaku, UMESAO Tadao, Vasilij EROŜENKO, KUBO Sadajroo,

HASEGAŬA Teru, HORI Jasuo, MIYAMOTO Masao ktp. Dume multaj estas malmulte konataj esperantistoj. Ili estas iomete malsamaj punktoj de la ĝenerala biblioteko.

Ekzistas ankaŭ ĉirkaŭ 13 500 revuoj kaj periodaĵoj. Vi povas vidi la revuojn en la frua tempo de Esperanto-movado. “La Revuo” estas ĝia nomo. Ĝi estas periodaĵo eldonita de 1906-a ĝis 1914-a, entute 96 numeroj. Ĉe ni ili ekzistas senmanke. Unu el redaktantoj de la revuoj estas nia Zamenhof.



Inter la donacitaj libroj troviĝas libroj subskribitaj de la aŭtoro aŭ kun dediĉo de la aŭtoro. Ilin ni konservas kun sensubskribitaj libroj.

### Klasifiko kaj publikigo de posedaĵoj

Librojn, periodaĵojn kaj diversajn dokumentojn ni klasifikas laŭeble fidele utiligante la tabelon de NDC, Japana Decimala Klasifika Tabelo. Ĉiuj materialoj estas registritaj en la datumbazo per FileMaker. Oni povas serĉi ĉiun libron aŭ periodaĵon. Nun ni ankoraŭ ne povas publikigi ĝin. Sed laŭ peto eĉ nun ni povas servi en serĉado.

(Pri la klasifiko, vidu n-ron 390, nov. 2023.)

(daŭrigota)

## sezonvorto aprila

### Malvarmeco en sakura sezono

Okita Kazumi

Portempa malvarmeco en la sezono kiam sakuroj ekfloras. Ĝenerale en mezjapana aprilo daŭras kaprica vetero. Tial oni diras ke bela vetero ne daŭras tri tagojn en printempo.

(花冷え)

